# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstr
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz


Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

**La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906**

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JANUARO/MARTO 2023** **Nro. 134 (1/23)**




# GRAVE !!!

# Ĉu ni devos adiaŭi nian sidejon?

**LOKE ...**

## Muy importante: Nuestra sede en peligro de perderse.

Estimad@ soci@

Sirva la presente para informarte de la delicada situación en que se encuentra el poder seguir disfrutando de nuestra sede en Barrencalle Barrena, en la que nos encontramos desde el año 1957.

La razón es, nuevamente, económica. Durante los próximos meses, existen planes para realizar una importante obra de renovación del inmueble.

Se han presentado 3 presupuestos. El más barato de ellos nos supondría un desembolso de **23.000 €** que, con las previstas ayudas que concedería el Gobierno Vasco a la Comunidad de Propietarios, se vería reducido a unos 16.000 €.

Aparte del montante que supone esta última cantidad, habría que tener en cuenta que deberíamos pagar, antes de recibir cualquier ayuda, los 23.000 €.

Aun no se ha aprobado ningún presupuesto pero esperamos que el comienzo de las obras no se retrase mucho.

El objeto de enviarte esta información es conocer la disposición de l@s soci@s y simpatizantes a ayudar dentro de sus posibilidades.

Os informaremos de las novedades que haya y, mientras esperamos noticias vuestras, os envíamos un cordial saludo.

## Ege grava informo: Ni riskas malhavi nian sidejon.

Karaj amikoj.

Ni volas informi vin pri la tikla situacio en kiu troviĝas nia plua restado en la loko, kiu estis la sidejo de la E-Grupo de Bilbao ekde la jaro 1957.

Kialo estas, unu fojon plian, manko de mono. Laŭlonge de la estontaj monatoj profunde oni renovigos la konstruaĵon, en kiu nestas nia sidejo.

Oni prezentis 3 buĝetojn. La plej malmultekosta el ili devigos nin pagi **23.000 €**. Kun esperebla helpo de la Vaska Registaro al la komunumo de propietuloj, tiu kvanto malpliiĝus ĝis proksimume 16.000 €.

Sed krom la problemo alfronti ĉi tiun lastan altan elspezon, ni devas antaŭvidi ke monhelpo alvenus nur post pago de la tuta ŝuldo, t.e., 23.000 €.

Ĝis nun neniu buĝeto estis aprobata, sed ni atendas la komencon de la renovigo en kiu ajn venonta dato.


La sendado de tiu ĉi informo celas esplori la inklinon helpi de nia sociaro kaj simpatiantoj, ĉiu laŭ siaj propraj rimedoj.

Ni informos pri alvenontaj novaĵoj kaj dume atendos reagojn el vi.

Ricevu elkorajn salutojn el la estraro de la E-Grupo de Bilbao.

**LOKE ...**

## Nuevo curso elemental de Esperanto/Nova elementa kurso.







El viernes 10 de marzo comenzará, en nuestra sede, un nuevo curso elemental de Esperanto. Tendrá lugar todos los viernes, de 19:30 a 20:30 h. Será gratuito y únicamente habrá que pagar el coste de los libros, que es de 30,00 euros. Una vez más, será dirigido por David Redondo.

Inscripciones en esperantobi@gmail.com o en el teléfono 656776065 (David).

## Zamenhofa tago en nia Grupejo.



Kiel anoncite, la 17an de decembro, je la 19a horo, ni kuniĝis en nia sidejo por kunmemori la naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof.

Bedaŭrinde malmulte da homoj ĉeestis la kunvenon, sed la etoso estis vere agrabla, kun vigla interparolado post la prelego kaj dum la komuna manĝo.

La programo estis jena:

19h. Jesús Miguel García Iturrioz prelegis pri "La malpli konata Zamenhof: cionismo kaj homaranismo".

19:30 h. Susana Zabaco ludis piane la Esperantan himnon, al kio akompanis la kantado de la ĉeestantoj.

20 h. Komuna manĝo de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

## LOKE ...


## Unu jaron plian ni maltrafis loteripremion.

Unu jaron plian, ni ne sukcesis atingi premion en la kristnaska loterio. Tamen, tio ne estas obstaklo por kore danki ilian helpon al ĉiuj, kiuj aĉetis niajn biletojn, skribitajn tute en Esperanto, kaj kiuj, samtempe, per eta mondonaco helpis al la subteno de nia E-Grupo.




Ni substreku ke estis aĉetantoj laŭlonge de la tuta Hispanio, kio faris ke niaj vendoj per interreto estis granda procento de la tutaj vendoj. Koran dankon al vi ĉiuj!

## "La Espero" ludata pere de txistu.




Ni ricevis tiun ĉi sciigon el Joseba kaj Mikel, esperantistoj de Sestao (Bizkajo).

Temas pri La Espero, ludata per triopo de "txistu"-oj (pr. "ĉistu"), tipa muzikilo de Vaskujo. Estas aranĝo de Joseba kaj José Ignacio Elías, txistu-ludanto el Gipuzko kaj tre konata en la muzik-mondo.

Se vi deziras ĝin spekti, per interreto eniru Jutubon kaj serĉu "La Espero Itxaropena".

La vorto "Itxaropena" ĝuste signifas "espero"-n en la vaska lingvo.

## Vizitis nin.



La pasintan 03n de februaro vizitis nin Simon Varwel, el Skotlando.

Sur la foto, Simon pozas meze de kelkaj membroj de la E-Grupo de Bilbao.

La sekvontan tagon li estis akompanata de Diego por viziti la belan marbordon de Bizkajo.

## Nia sociaro.

Dum la jaro 2022, al la E-Grupo de Bilbao,
Aliĝis neniu homo.
Eksiĝis 1 homo.
Je la 31 de decembro 2022, ni nombris 53 anojn.

**H.E.F.**

## La venonta HEF-kongreso en Sevilo.



La venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazos **de la 12a ĝis la 15a de oktobro** en Sevilo. La ĉeftemo de la renkontiĝo estos "Esperanto, komprenemo inter popoloj". Ĉiuj jam povas proponi sin por prelegi pri temo rilata al tiu afero aŭ ĝenerale pri kiu ajn temo rilata al la internacia lingvo. Same, ene de la kultura flanko kiu ajn povas proponi aktojn kiuj povus esti aranĝitaj dum la kongreso kaj pli specife ene de la programero "Vivu la Teatro".

*(J.M.R., Membro de la Organiza Komitato. 30/01/2023)*

## Lerneja Scienca Kalendaro 2023 en Esperanto.




La Lerneja Scienca Kalendaro 2023, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), ĉijare denove havas version en Esperanto.

La kalendaro enhavas kolekton de eventoj aŭ datrevenoj ligitaj al scienco (en ampleksa senco) por ĉiu tago de la jaro, kun speciala atento al la diverseco de la ĉefroluloj.

Vi povas ĝin trovi, elŝuti kaj printi en pluraj versioj el:

https://digital.csic.es/handle/10261/285166

La kalendaro en Esperanto havas propran tŭiteran konton, kiu ĉiutage publikigas la koncernajn datrevenojn.

Pri la tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio. Mencio al Esperanto kaj agnosko al la kunlaboro de HEF aperas en la oficiala prezento fare de la CSIC, kiu okazis ĉimatene, kaj kiun vi povas trovi ĉe:

https://www.csic.es/es/actualidad-del-csic/el-calendario-cientifico-escolar-2023-ya-esta-listo-con-nuevas-efemerides

*(J.A.d.B. 09/01/2023)*

### Nova ĉefpaĝo de la reta katalogo de la biblioteko Juan Régulo Pérez.




Informas la respondeculino, Ana Manero: “Ni devis ĝisdatigi la programon al pli nova versio kaj profitis por iom renovigi la fasonon.

Vi povas viziti tiun trezorejon en

https://bibliotekojrp.esperanto.es/

**H.E.F.**

## Prezentado de libro kun tradukoj el Esperanto.




La 16an de novembro okazis publika prezentado de la libro "Poesías, marchas y canciones de las Brigadas Internacionales", ("Poezioj, marŝoj kaj kantoj de la internaciaj brigadoj"), kompilita de la historiisto Jacinto Arévalo. Ĝi celas diskonigi parton de la literaturo originita de la Internaciaj Brigadoj dum la hispana intercivitana milito, tiun verkitan verse, kiel poeziaĵoj, romancoj, kantoj kaj simile. Oni montras ĉ. tricent pecojn, verkitajn en la germana, franca, pola, itala, hispana, kataluna kaj aliaj lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto.

La libro enhavas 14 esperantlingvajn poemojn kun ĝia traduko en la hispana fare de Miguel Fernández. Ili estis ĉerpitaj el la fama revuo "Popola Fronto", kaj inter la aŭtoroj troviĝas iuj tiel famaj kiel Julio Mangada, Eŭgeno Miĥalski, Konstanteno Gusev, kaj aliaj.

En la prezento la kompilinto aparte menciis la gravecon de la esperanta kontribuo kaj la helpon de la esperantistoj.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 85. Dec. 2022)*

## Patronino de la esperantistoj.



Ĉi momente la hispana Vikipedio montras kiel elstaran artikolon "Hildegard von Bingen", kreinto de la unua artefarita lingvo, "Lingua Ignota". En tiu artikolo, Hildegard estas nomata "patrona de los esperantistas".

https://es.wikipedia.org/wiki/Hildegarda_de_Bingen

*(P.H. El Interreto. 29/01/2023)*

## Lerneja debato en Fuenlabrado.

La delegitaro por la sudo de Madrida regiono de la Universitato UNED, kune kun kelkaj urbestraroj de tiu regiono (Leganés, Fuenlabrada, Parla, Pinto kaj Alcorcón) organizas konkurson pri debato en lernejoj ("liga de debate escolar"). Okazos unue municipa fazo, dum januaro, februaro kaj marto, kun fina intermunicipa konkurso en aprilo kaj majo. Ĉiu urbo elektas propran temon, kaj la temo en Fuenlabrado de tiu unua fazo estos… **Esperanto**!, konkrete, la ebla rolo de Esperanto en eŭropuniaj institucioj.

La partoprenontoj devos informiĝi pri la temo, serĉi argumentojn por la debato, disvolvi kritikan alrigardon.

En la konkurso entute partoprenos 40 mezlernejoj, kaj do estas unu el la plej gravaj tiaj iniciatoj tutlande.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 85. Dec. 2022)*

# TRA LA MONDO …

## “Gloria Artis”: pola ministeria medalo por Roman Dobrzyński.



Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA), en la 10-a de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab.D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “Gloria Artis”. En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li kunorganizis la plej grandan Universalan Kongreson, en Varsovio; kaj kiel televida raportisto, pro kio li atestis gravajn historiajn eventojn kaj realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistriĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. Kiel studento li aktivis en la Esperanto-movado per verkado, redaktado kaj instruado, kaj kiel estrarano de Pola Esperanto-Junularo. Li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de Kontakto (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn, farante ankaŭ filmojn pri Esperanto, ekz-e “Bona Espero” (1984). Jam en 1980 la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. En 1995 li cetere iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”, de BBC. Li estas membro de UEA ekde 1961 kaj estis komitatano kaj vicprezidanto de UEA (1989-92). Li kontribuis al la establo de Fondumo Zamenhof kaj estis ĝia dua prezidanto. En 2003 aperis lia libro La Zamenhof-strato, pri interparoloj kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, poste tradukita en multajn lingvojn. En 2005 li estis elektita Honora Membro de UEA kaj ricevis la unuan premion de la Fondaĵo Grabowski pro siaj esperantlingvaj filmoj kaj la verko La Zamenhof-strato.

En interkonsento kun Bjalistoka Esperanto-Societo estis decidite, ke taŭga okazo por enmanigi la medalon al Dobrzyński estos la 23-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. La solenaĵo okazis la 10-an de decembro en Bjalistoko kaj la medalon transdonis la vojevodo (provincestro) de Podlaĥia Provinco, S-ro Bohdan Paszkowski.

*(El la Gazetaraj Komunikoj de UEA. Jan. 2023)*

## Alia pilko en la futbala mondpokalo.




En Facebook, aperis informado de Ulrich Matthias:

“Ekde nun, por la lastaj matĉoj, ĉe la Futbala Monda Pokalo oni uzas novan pilkon, "Al Hilm", anstataŭ "Al Rihla" (kies signifo ŝajne estas "revo"). Ankaŭ ĝi surhavas esperantan surskribon.

Ŝajnas, ke oni nun metis la arabajn vortojn centre kaj la vortojn en la 5 aliaj lingvoj ĉirkaŭe. Entute oni nun trovas la vortojn "KUNE", "PASIO", "INSPIRO", "FIERECO" kaj "TRADICIOJ".

Ankoraŭ oni ne scias la motivon pri la apero de Esperanto kun aliaj 5 lingvoj (araba, angla, hispana, ĉina, franca) sur la pilko.

*(L.N. 12/12/2022)*

# TRA LA MONDO …

Jen io plia pri la pilko de la futbala mondpokalo:

La germana sportfirmao Adidas kaj FIFA (Federacio Internacia de Futbalo Asocia) elektis utiligi Esperanton kiel unu el la lingvoj aperantaj sur la oficialaj pilkoj de la Futbala Mondpokalo 2022. Pri tio UEA informis plej unue pere de la n-ro 1 de *Facila Vento*, la Kongresa Kuriero de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto.


[...]

La inkluzivon de Esperanto sur la pilko iniciatis la direktorino de dezajno de Adidas, Franziska Loffelmann, laŭ informo de la revuo *Esperanto*.

Tio kaj pli kompleta informado en gazetara komuniko de UEA: uea.org/gk/1085a1

*(L.N. 18/12/2022)*

## Pelé esprimis apogon al Esperanto.




Mi enmetas bildon (aperinta en Facebook) kiu rilatas al "Esperanto-Gazeto" (organo de IOE-Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto) proksimume je 1970 aŭ 1971.

IOE estis internacia iniciato aktiva aparte en la 1950-aj ĝis 1980-aj jaroj, laŭ fondo kaj gvido fare de la esperantista ĵurnalisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj.

Sian sidejon la institucio havis en Beogrado, la tiutempa ĉefurbo de Jugoslavio. La instituto lanĉis la sloganon «Pli bona praktiko ol 100-hora prediko»

*(L.N. 30/12/2022)*

La manskribita teksto, en la portugala, diras: “Esperanto estos tre utila al la sportistoj ĝenerale por ilin alproksimigi kaj faciligi al ili la interrilatojn amikajn kaj sportajn”

## E-kongresoj 2023.

- 18/25 jul. 96-a SAT-kongreso. Kastelo Greziljono (Francio).
- 20/23 jul. 40-a Pola E-Kongreso. Siedlce, 96 km oriente de Varsovio.
- 29 jul/05 aŭg. 108-a Universala Kongreso. Torino (Italujo).
- 05/12 aŭg. 79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Lignano (Italujo)
- 12/15 okt. 81-a Hispana Kongreso. Sevilo/Sevilla.